

KIO ESTAS LA VERO?

Kiam Jesuo staris antaŭ Pilato li diris, *“Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon, ke mi atestu pri la vero.”* (Johano 18:37) Kredeble la respondo de Pilato “Kio estas la vero?” estus la respondo de la plej multo da homoj en la nuna mondo. Pilato ne atendis respondon al tiu demando, eble pensante, ke ne povas esti ia respondo. Multaj homoj opinias, ke povas esti diversaj ‘veroj’ en diversaj tempoj kaj situacioj; ke tio, kio estas la vero por unu homo ne estas necese la vero por alia homo. La Biblio tamen ne uzas tiel la esprimon, sed parolas pri unu absoluta neŝanĝebla vero:

“Vi savas min, ho Eternulo, Dio de la vero.” Ps.31:5

“... la vero de la Eternulo restas eterne.” Ps.117:2

“... Via instruo estas vero.” Ps.119:142

“... Dio ... kiu gardas la veron eterne ...” Ps.146:6

“... Dio ... Liaj adorantoj devas adori Lin laŭ spirito kaj vero.” Jn.4:24

“... vi scios la veron kaj la vero vin liberigos.” Jn.8:32

“Jesuo diris ... min, homon, kiu parolis al vi la veron, kiun mi aŭdis de Dio ...” Jn.8:39-40

“Jesuo diris ... mi estas ... la vero...” Jn.14:6

“Konsekru ilin en la vero; Via vorto estas vero.” Jn.17:17

“... al tiuj, kiuj... ne obeas al la vero ... koleron kaj indignon ...” Rom.2:8

“... la vorton de la vero, la evangelion de via savo ...” Efes.1:13

“... estu juĝataj ĉiuj, kiuj ne kredas la veron ..” 2 Tes.2:12

“... Dio ... volas, ke ĉiuj homoj estu savataj kaj venu al scio de la vero.” 1 Tim. 2:3-4

“Mi treege ĝojas, ke mi trovis iujn el viaj infanoj iradantaj en la vero ...” 2Jn.:4

Tiuj citaĵoj klare montras, ke la vero estas tre grava temo en la Biblio; ke scio kaj akcepto kaj obeo al la vero nepre necesas por savo.

“... se iu el vi forvagos de la vero, kaj iu lin returnigos, oni sciu, ke tiu ... savos animon el morto ...” Jak.5:19-20

Scio estas esenca

Klare la vero pri kiu la Biblio instruas estas la instruo de Dio, la evangelio, kiun Jesuo kaj la apostoloj predikis. Jesuo diris *“... jen estas la eterna vivo, ke ili konu Vin, la sole veran Dion, kaj tiun, kiun Vi sendis, Jesuon Kriston.”* Jn. 17:3. Kaj Paŭlo avertis, ke la Sinjoro Jesuo venigos *“... venĝon sur tiuj, kiuj ne konas Dion kaj ne obeas al la evangelio ...”* 2Tes.1:7-8. Tra la Malnova Testamento Dio tre ofte esprimas Sian fortan deziron, ke la homoj sciu aŭ sciiĝu pri Li, ekz. El.8:10, 22; 16:6; Read.4:35, 39 kaj pli ol 90 fojoj en Jeĥezkel. Dio volas, ke la homoj sciiĝu pri Li ĉar *“Mia popolo pereos pro tio, ke ĝi ne havas scion ... Mi deziras ... konadon de Dio.”* Hoŝea 4:6 kaj 6:6

Provoj de profetoj

La Biblio pretendas esti vera, enhavi la vortojn de Dio. Per la Biblio Dio parolas al la homoj, sciigante al la homoj kiel konduki kaj donante konsilon por la bona vivo. La Malnova

Testamento profetis pri tio, kio okazos en la Nova Testamento, kaj la Nova Testamento baziĝas sur la Malnova. Oni devas provi iun ajn alian profetaĵon, por konstati ĉu ĝi akordas kun la Biblio. Evidente se la Biblio estas vera, io, kio malakordas kun ĝi devas esti malvera.

Dio donis al la Izraelidoj metodon per kiu ili devis provi ĉiujn profetojn, nome: se tiu profeto proponus adoron de alia Dio, li estas falsa, eĉ se li farus miraklojn. Read. 13:1-5

Simile Jesuo donis provon ĉu iu homo, kiu pretendas esti disĉiplo vere estas tia:

“Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havas amon unu al alia.” Jn.13:35

Ankaŭ Johano avertis, ke necesas provi ĉu iu homo, kiu pretendas esti profeto kiu ricevis mesaĝon de Dio, parolas la veron:

“... kedu ne al ĉiu spirito, sed provu la spiritojn, ĉu ili estas el Dio; ĉar multaj falsaj profetoj eliris en la mondon. Jen kiel vi ekkonas la Spiriton de Dio: ĉiu spirito, kiu konfesas, ke Jesuo Kristo venis en la karno, estas el Dio; kaj ĉiu spirito, kiu ne konfesas Jesuon, ne estas el Dio; kaj ĉi tiu estas la spirito de antikristo, pri kiu vi aŭdis, ke ĝi venas; kaj nun ĝi jam estas en la mondo.” 1Jn.4:1-4

Tiuj provoj estas definitivaj kaj ne miskompreneblaj. La Malnova Testamento insistas, ke ekzistas nur unu Dio, kaj la Nova Testamento postulas akcepton de Jesuo “en la karno”, kiu signifas, ke li estas homo. Ĉiu profeto, filozofa aŭ religio, kiu malsukcesas je tiuj provoj devas esti falsa, kaj iu ajn homo, kiu ne amas aliajn ne estas vera kristano.

Ĉiuj bezonas savon

La vorto ‘religio’ signifas ‘re-ligadon’. En la komenco Dio kreis la homon ‘tre bona’, sed Adam malobeis la ordonon de Dio; li pekis. Tiel li rompis la komunikon inter si kaj Dio, venigante sur sin kaj sur siajn posteulojn la meritan punon, nome morton. Gen.1:31, 2:17, 3:17-24

Peko estas laŭlitere maltrafo aŭ malsukceso; Adam malsukcesis vivi kiel Dio intencis, kaj ĉiuj homoj simile malsukcesas, kiel Paŭlo skribis “...ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio.”

Rom.3:23 . Sekvas do, ke ĉiuj bezonas savon. Sen savo ĉiu homo pereus ĉar “...*la salajro de peko estas morto.*” Rom.6:23

Neniu povas sin savi; nur Dio povas provizi vojon per kiu la homoj povos eskapi la punon; nur Dio povas ‘re-ligi’ la homojn al Si. Dio povus tute ĝuste lasi nin morti, sed Li estas “*indulgema kaj kompatema*” El.34:6. Li ne volas, ke ni pereu, kaj la vojo, kiun Li provizis estas Jesuo Kristo, kiu mem diris:

“Mi estas la vojo ... neniu venas al la Patro krom per mi.” Jn.14:6

Denove la vortoj estas klaraj kaj simplaj; la homoj povas aŭ humile akcepti ilin aŭ malakcepti ilin. Dio proponas la vojon al savo sed ne devigas iun akcepti ĝin, kaj neniu rajtas elpensi aŭ postuli iun ajn alian vojon.

Sekvas do, ke la sola vera religio estas kristanismo. Homaj ideoj, paganaj idoloj, humanismaj filozofioj - ne grave kiel bonfarantaj - ne povas savi la homojn. La Biblio insistas, ke savo estas nur en Jesuo:

“...en neniŭ alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj.” Ag.4:12

Humileco

Neniŭ rajtas diri al Dio, ke li iel meritas savon pro tio, ke li estas pli bona ol aliaj homoj aŭ, ke li estas honesta kaj donacema aŭ eĉ, ke li faris multajn potencaĵojn en la nomo de la Sinjoro, ĉar tiu diros al li *“mi neniam konis vin; forigu de mi ...”* Mt.7:22-23. La homoj ne povas perlabori savon, kiel Paŭlo avertis:

“...praviĝas homo ne per faroj de la leĝo, sed nur per fido al Jesuo Kristo.” Gal.2:16

Tio estas tre malfacila por ni; nia natura fiero signifas, ke ni ne volas esti tiel dankoŭлда al iu; ni preferas esti memstaraj. Tamen tiu homa fiero apartigas nin de Dio; Li deklaris:

“Nur tion Mi rigardas; humilulon kaj spirite-afliktiton, kiu respektegas Mian vorton.” Jes.66:2

Oni ne supozu, ke plaĉas al Dio ia servado aŭ ofero, kiun Li ne ordonis. La Biblio enhavas multajn ekzemplojn de homoj, kies oferojn aŭ servojn Dio malakceptis pro tio, ke ili ne estas laŭ Liaj ordonoj, aŭ, eble pli ofte, pro tio, ke la ofero ne estas sincera, ekz.

- Nadab kaj Abihu, kiuj alportis ‘fremdan fajron’ Lev.10: 1-2

- Saul, kiam li ne tute eksermis la Amalakidojn kaj bestojn, sed savis iujn bestojn por buĉoferi al Dio. Rimarkindaj estas la vortoj de Samuel:

“...obeado estas pli bona ol buĉfero ... malobeo estas ... kiel peko de idolservo ...” 1Sam.15

Dio ne ŝanĝiĝis; Li postulas obeadon nun same kiel tiam. Saul kaj la aliaj pensis, ke ili bone faris; tio signifas, ke ĉiu taksis sian opinion pli alte ol la ordonoj de Dio; tiu estas homa fiereco. Tamen *“Dio kontraŭstaras al la fieruloj, sed al la humiluloj Li donas gracon.”* Jak.4:6 Jesuo riproĉis la Fariseojn ĉar ili simile pensis, ke ili bone faris, plenumante ne la ordonojn de Dio sed siajn tradiciojn:

“Kial vi ... transpasis la ordonojn de Dio per via tradicio? ... Ho hipokritulojn, bone profetis Jesaja pri vi dirante: ‘vane ili Min adoras, instruante kiel doktrinojn ordonojn de homoj.’” Mt.15:3-9, Jes.29:13

Fido

Konfirmante, ke homoj saviĝos ne per agoj sed per fido, estas skribite:

“...sen fido neeble estas plaĉi al Li; ĉar necese estas, ke tiu, kiu alvenas al Dio, kredu, ke Li ekzistas, kaj, ke Li fariĝas rekompencanto al tiuj, kiuj Lin diligente serĉas.” Heb.11:6

Tiuj vortoj estas difinitivaj kaj absolutaj - nur tiuj, kiuj kredas saviĝos. Fido al iu malvero estas nura superstiĉo, do denove estas substrikita la nepra neceso trovi la veron.

Kontraŭdiroj

Konstatinte, ke la vera religio devas esti kristanismo, ĉiu homo, kiu serĉas la veron devas alfronti la bedaŭrindan fakton, ke ekzistas multaj kontraŭdiroj inter al diversaj eklezioj, kiuj nomas sin kristanaj. Ĉiuj el ili pretendas, ke liaj kredoj baziĝas sur la Biblio, tial necesas sekvi la

ekzemplon de la Bereanoj kiuj, aŭdintaj la predikadon de Paŭlo tuj “...ĉiutage esploris la Skribojn, por konstati, ĉu tiuj aferoj estas veraj.” Ag.17:11

Ĉu povas esti ĝuste kredi, ke Dio estas Triunuo - ‘unu en tri kaj tri en unuo’, kiam la Biblio eĉ ne enhavas tiun vorton?

“...nia Dio, la Eternulo estas unu ...” Mk.12:29

“...ne ekzistas Dio krom unu ... por ni estas unu Dio, la Patro ..” 1Kor.8:4-6

Ĉu povas esti ĝuste instrui, ke Jesuo estas Dio, dum la Biblio ĉiam nomas lin ‘la Filo de Dio’?

Estas nature demandi ĉu li estas Dio pro tio, ke Dio estas lia Patro, sed la Biblio klare diras, ke li estas homo:

“...tiu viro, kiun Li elektis ... Li relevis lin el la mortintoj.” Ag. 17:31

“...per la ... unu homo Jesuo Kristo.” Rom.5:15

“...ekzistas unu Dio, kaj unu interulo inter Dio kaj homoj, homo, Jesuo Kristo.” 1Tim.2:5

Ĉu povas esti ĝuste pensi, ke Jesuo estas nur ordinara homo kun homa patro?

“...antaŭ ol ili (Maria kaj Jozef) kunvenis, ŝi troviĝis graveda per la Sankta Spirito.”

Mt.1:18

“...la potenco de la Plejaltulo superombros vin; pro kio ankaŭ la naskotaĵo estos nomata sankta, la Filo de Dio.” Lk.1:35

Plue la Biblio diras, ke Jesuo estas malsimila al aliaj homoj pro tio, ke kvankam tentita same kiel ni, li neniam pekis:

“...tentita en ĉio tiel same, tamen sen peko.” Heb.4:15

“...pekon li ne faris ...” 1Pet.2:22

Ĉu povas esti ĝuste kredi, ke la homo posedas senmortan animon, kiu daŭre ekzistas kaj restas konscia post morto, kiam la Biblio nenie uzas la esprimon ‘senmorta animo’?

“...tiu animo, kiu pekas, ĝi mortos.” Jeĥ.18:4

“...la mortintoj scias nenion.” Pred.9:5

Ĉu povas esti ĝuste instrui, ke la mortintaj kredantoj jam ĝuas eternan feliĉon en la ĉielo, dum la Biblio diras:

“...ĉiu, kiu ...kredas ...mi levos en la lasta tago.” Jn.6:40

“...estos iam relieviĝo de la justuloj kaj de la maljustuloj...” Ag.24:15

Ĉu povas esti ĝuste diferencigi inter pastraro kaj laikaro, dum la Biblio diras:

“...nomu neniun sur la tero via patro; ĉar Unu, kiu estas en la ĉielo, estas via Patro. Kaj ne estu nomataj edukantoj; ĉar unu, la Kristo, estas via edukanto.” Mt.23:9-10

“...vi estas raso elektita, pastraro reĝa...” 1Pet.2:9

“...pripensu la ...Ĉefpastro de nia konfeso, Jesuon...” Heb.3:1

“La reĝoj de la nacioj faras sin sinjoroj super ili...sed vi ne estu tiaj; sed kiu estas la pli granda el vi, tiu fariĝu kiel la plej juna; kaj tiu, kiu estas ĉefa, kiel la servanto.”

Lk.22:25-26

Ĉu povas esti ĝuste preĝi al Maria aŭ al ‘sanktuloj’ kiam la Biblio diras:

“...ekzistas...unu interulo inter Dio kaj homoj, homo, Kristo Jesuo.”

Kutimoj kaj tradicioj

Ni homoj ĉiam emas koncentri la atenton al eksteraĵoj. Multaj eklezioj festas specialajn tagojn kaj havas regulojn pri manĝaĵoj, sed Paŭlo diris, ne nur ke tio ne necesas sed, ke tio apartigas homojn de Kristo:

“...vi observas tagojn kaj montojn kaj tempojn kaj jarojn. Mi timas pri vi...” Gal.4:10-11

“Vi, kiuj volas vin pravigi per la leĝo, apartiĝis for de Kristo ...” Gal.5:4

Jesuo klare diris, ke ne gravas kion homoj manĝas:

“...ekzistas nenio, kio, enirante en homon de ekstere, povas lin profani ...” Mk.7:15

Al siaj disĉiploj Jesuo donis neniajn ordonojn pri riĉe ornamitaj preĝejoj, krucoj, ikonoj, kandeloj, incenso, ĉantado, mesvestoj, procesioj, pentofaradoj k.t.p. Ĉiuj tiaj estas homaj aldonaĵoj kaj tradicioj, kiuj ne efikas savi homojn. Fakte li ordonis al siaj sekvantoj nur du ritojn, nome bapton kaj partoprenon de pano kaj vino memore de lia morto kaj releviĝo:

“Iru do, kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin ...” Mt.28:19

“... kiu kredas kaj estos baptita, tiu estos savita; sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita.” Mk.16:16

“...prenu, manĝu ... vi ĉiuj trinku ...” Mt.26:26-27

“... ĉi tion faru por memorigo de mi.” Lk.22:19

sed eĉ tiujn simplajn ordonojn oni ŝanĝis aŭ neglektis.

Ĉu povas esti ĝuste anstataŭigi per aspergado la ĝustan bapton per tuta subakviĝo, simbolo de morto kaj releviĝo?

“... ni do estas entombigitaj kun li (Jesuo) per bapto al morto ...” Rom.6:4

“... ili ambaŭ malsupreniris en la akvon ... kaj li baptis lin.” Ag.8:38

Ĉu povas esti ĝuste bapti infanojn, kiuj povas nek kredi nek penti? Se eĉ Jesuo mem baptiĝis, ĉu iu ajn povas neglekti tion?

“... se vi kredas per via tuta koro, tio estas permesata.” Ag.8:37

“... Jesuo diris ... tiel decas al ni plenumi ĉian justecon.” Mt.3:15

Provu ĉion

Neniu povas cedi al iu ajn alia homo la devon serĉi la veron:

“... serĉu, kaj vi trovos ... Gardu vin kontraŭ falsaj profetoj ... Per iliaj fruktoj vi konos ilin ... Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro...” Mt.7:7, 15-21.

Kio estas la volo de Dio? Jesuo diris, ke la plej gravaj ordonoj estas:

“... amu la Eternulon, vian Dion ... amu vian proksimulon ...” Mk.12:28-31

Ĉu povas esti ĝuste do partopreni aŭ subteni ian ajn militon aŭ perskuton? La provo de vera Kristano estas ĉu oni amas:

“Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se ve havos amon unu al alia.”

Jn.13:35

“... Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj; por ke vi estu filoj de via Patro, kiu estas en la ĉielo ...” Mt.5:44-45

Kia do estas la vero, kiun Jesuo predikis? Preskaŭ ĉiu el liaj paroloj temas pri la regno de Dio aŭ la regno de la ĉielo. La vorto ‘regno’ aperas pli ol 160 fojojn en la Nova Testamento - pli ofte ol la vorto ‘amo’. Tial la vera eklezio devas esti kiel Paŭlo, kiu estis ĉiam *“predikante la regnon de Dio kaj instruante la aferojn pri la Sinjoro Jesuo Kristo ...”* Ag.28:31

Resumo

“Estas unu korpo, kaj

unu Spirito, kiel ankaŭ vi estis vokitaj en

unu espero de via voko;

unu Sinjoro,

unu fido,

unu bapto,

unu Dio kaj Patro de ĉiuj, kiuj estas super ĉiuj,

kaj tra ĉiuj, kaj en ĉiuj.”

Efes.4:4-6

Jean Field